Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

BIBLIOTEKO
GRUPO ESPERANTISTA

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

4a jaro | Oktobro 1990 | Numero 21 (3)







NOVAJ REVUOJ EN ESPERANTO

legu sur paĝoj 6 kaj 7

NIAJ KURSOJ.

Post sufiĉe da monatoj dum kiuj okazis necesaj riparoj kaj plibonigoj en nia sidejo (barnizado de la planko, reformo de la klaso, ktp) denove ekmarŝas niaj aktivaĵoj; tiel kaj kiel ĉiujare komencis elementa kurso la 8-a de Oktobro. Por ĝin diskonigi, la Bilbao-Bizkaja Ŝparkaso donacis al ni belan trikoloran afiŝon (2.000 ekz.); bedaŭrinde, kaj pro nesufiĉa kunlaboro de niaj membroj, ni nur povis alglui 500 ekz. tra nia urbo. Ni esperas ke en Januaro, por propagandi la Februarajn kursojn niaj asocianoj (precipe la plej junaj) estos pli pretaj helpi.

ZAMENHOFA NASKIĜDATREVENO.

Kiel ĉiujare, la Sabaton 15-an kaj la dimanĉon 16-an de Decembro, ni festos la naskiĝdatrevenon de la fondinto de nia Internacia Lingvo. En venonta numero de NIA PONTO ni informos pli detale al vi.

KRISTNASKA LOTERIO. (LOTERIA DE NAVIDAD)

Jam eblas aĉeti ĝin. RAPIDIĜU aŭ vi riskas ne riĉiĝi.

Esperanto - Grupo ★

Barrencalle Barrena, 7 - 1.° - ☎ 416 44 92 - 48005 BILBAO

Nacia Loterio

N-ro

La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per **Ducent kvindek pesetoj**, la numeron **04065**, kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 1990-a.

250 pesetoj

Caduca a los 3 meses. Senvalora post 3 monatoj. 3 hilabete ondoren, balore gabe.



VIDEOBENDO
pri la
49-a HISPANA
KONGRESO DE
ESPERANTO
Bilbao, 1989

VIDEOBENDO.

Jam eblas aĉeti la videobendon de la 49-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Bilbao inter la 19-a kaj 23-a de Julio 1.989-a. Sistemo: VHS. Daŭro: 68 min. Prezo: 2.000 ptoj. + Sk. Petoj: Grupo Esperantista de Bilbao.

NEKROLOGOJ.

Dum tiu-ĉi jaro 1990-a ni devis porĉiam adiaŭi al kvar el niaj asocianoj:

Floreal Manteca Martín (9-Feb.)
Laura García Ortega (7-Mar.). Filino de "Paco", la blindulo.
Mercedes Marqués (22-Jun.). Vidvino de Sro. Ozaita.
Pedro Benedicto Alvarez (5-Jul.)

Se ni bedaŭras ĉies mortojn, plej kortuŝa al ni estis tiu de Pedro Benedicto, aktiva esperantisto, dum kelkaj jaroj gvidanto de E-kursoj, eks-estrarano, vigla partoprenanto en ĉiuj niaj aranĝoj kaj ĉiam preta help-konsilanto. Ke ili ĉiuj pace ripozu!.

BIBLIOTEKO.

Post longa kaj labora klasifikado de ĉiuj libroj kuŝantaj sur la bretoj de nia maljuna kaj forgesita biblioteko, denove eblas pruntedoni ilin al la membroj de nia Societo. Laŭ oni decidis en la lasta Ĝenerala Kunveno, estas du respondeculoj pri ĉiuj aferoj kiuj rilatas la bibliotekon kaj Libro-Servon de nia Grupo, nome, **Jesús Miguel García kaj Teodoro Ibáñez**.

Por kia ajn demando, sugesto, aĉeto-forpreno-redono de libroj, propono de novaj aĉetoj, ktp., turnu vin al ili, sed atentu ke **LA BIBLIOTEKO MALFERMIĜAS NUR LA VENDREDOJN, INTER LA 7-A KAJ 9-A HOROJ, VESPERE**.

Humuro

MONATO



„Mi prezentas jenajn kondiĉojn!"



„Kiel do povis okazi, ke el tiu iraka bebo fariĝis tiom giganta fortulo?"

MONATO





LF-koop

ESPERANTA SONGAZETO 7

"... alportas tutan horon da E-kulturo en viaj oreloj. Ĝi kantas, muzikas, deklamas, prelegas. El la pluraj etosoj de la tuthora programo min plej ĉarmis la kanzonoj de Jan Stanislaw Skorupski, kiu artistas pri ĉio, sed ĉi-tie, pri muziko. Kontrapunktas ĝin fragmento el "Mesio" de Händel, ĝuebla eĉ por bosanovemuloj, pri kies teksto ŝvitis kolego Imre Szabó, redaktoro de "Budapeŝta Informilo". Kiel ĉe ĉiuj bonaj tradukoj, la ŝvito tute ne flareblas.

La lasta publika prelego de Edmond Privat interesos ne nur ŝimajn filologojn ... La reston de la kasedo plenigas italoj per poemoj de Clelia Conterno kaj Nicolino Rossi. Eĉ recenzo pri muziko ne mankas ...". (István Ertl, redaktanto "Kontakto").

tion kaj plion vi akiros per
ESPERANTA SONGAZETO
baldaŭ aperos la numero 8!
ideala por progresantoj kaj izoluloj

Petu ĝin en nia Grupejo. PREZO: 950 ptoj

NOVAJ REVUOJ EN ESPERANTO

Jen sekve prezento de tri novaj gazetoj ĵus aperintaj sur la E-merkato. Ĝiaj kampoj estas vere variaj kaj certe interesaj. Vi mem elektu kaj se iu kaptus vian atenton, kontaktu ĝian eldonanton aŭ nin mem.

En estontaj numeroj de NIA PONTO ni ankaŭ informos pri aliaj titoloj kaj jarabonoj de la plej konataj E-revuoj. Kaj memoru: multaj el ili vi povas legi en nia Grupo. Utiligu tiun eblecon!.

Rok-gazet' aŭ "la unua Esperanto-rok-fangazeto"

Tiu-ĉi eldonaĵo de EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio) aperis tute en Esperanto antaŭ nelonge. Sur ĝiaj paĝoj oni trovas (eĉ forte!) la konatajn Kajto, Team', Persone, Amplifiki, T.B.C., la malpli konatan Kredo (Sovetunio) kaj diversajn surprizojn, individuaj kaj grupaj, el Argentino, Pollando, Sovetunio, Ĉinio, Zairio, k.a.. Kvankam la lingva nivelo kaj prezento ne estas tre altnivelaj, la vigleco kaj internacieco de la enhavo kompensas tiajn mankojn. Muzikemuloj nepre anoncu sin ĉe la redaktejo:

Eurokka, F-31450 Donneville (Francio). Jarabono (4 ekz..:100 FF)

ENIGMO, Revuo pri spritaj ludoj en Esperanto

Aperis en Septembro la n-ro. 1 de tiu-ĉi dumonata speciala revuo pri krucvortoj. Ĝi enhavas 28 paĝojn, plenplenaj da plej variaj krucvortaroj, ŝaradoj, rebusoj, anagramoj, puzloj, kriptaĵoj, ktp., aparte konstantaj rubrikoj pri ŝako, goo, skraboj, interesaj artikoloj pri civilizaj sekretoj (en tiu-ĉi numero temas pri la maja-a skribmaniero). La revuo, profesie presita, certe superas al naciaj similaj eldonaĵoj.

Jen kion diras, en prezento/enkonduko, la ĉefredaktoro, Viorel Paltineanu, respondante al ebla demando: "Kial tia revuo?. Eble ĉar ni volas kunporti en viajn hejmojn la eblecon praktiki ĉiumomente Esperanton ... Ĉar ni volus ankoraŭ unufoje montri al aliuloj kaj al ni mem, kiel nature Esperanto povas interne fleksii, kiel facile ĝi povas krei "la ludan movon", ĉar ludi kun la lingvo signifas ĝin uzi en siaj plej profundaj ecoj ...".
En la lasta paĝo de NIA PONTO vi povas rigardi specimenon.

Revuo "ENIGMO", BP 7 , Toulouse Cedex, FRANCIO
Jarabono (t.e. 6 numeroj sekvantaj): 1.600 ptoj.

Vjetnamio (Vjetnama ilustrita revuo)

Tiu-ĉi oficiala vjetnama revuo, kiu celas konatigi, al alilandaj legantoj, la tieajn homon kaj landon, aperis, ĝis nun ĉiumonate, en jenaj lingvoj: vjetnama, lao, kmer, rusa, angla, franca, hispana, ĉina kaj (trimonate) germana; kaj, ekde tiu-ĉi jaro, ankaŭ en Esperanto (trimonate).

Ĉiam laŭ oficiala (registara) vidpunkto, la revuo prezentas, en vere luksa eldono, kun nigraj kaj koloraj fotoj, diverstemajn artikolojn pri la vivo en tiu lando: pri edukado, kampara vivo, sporto-varoj, tradiciaj boks-artoj, malnovaj edzecaj moroj, ktp. Burĝone, tre simila al tiu alia tre konata E-revuo "El Popola Ĉinio" kaj, pro tio, ankaŭ sufiĉe interesa por montri la internaciecon de nia lingvo, precipe devenante ĝi el tiel ekzotika azia lando.

Abonpetoj ĉe: 207 Nguyên vãn Cu, TP Hô Chi Minh (Vjetnamio).
Jarabono (4 ekz.): 7 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.



Vjetnamio: Hoĉiminanoj en Hanojo

La 24-an de junio, Hanoja E-Klubo organizis renkontiĝon por pli ol 80 esperantistoj el la vjetnama ĉefurbo, ĉe kiu gastis ankaŭ kvar aktivuloj el fora Ho Chi Minh-urbo (foto). En la renkontiĝo partoprenis i.a. esperantistoj-oficistoj de Hanoja Turisma Asocio (malferminta Esperanto-fakon) kaj formiĝis laborgrupoj pri medicino, fervojo, junularo kaj instruado. Urbaj ĵurnaloj raportis pri la aranĝo.
Hanoja E-Klubo, 46 str. Trân Hung Dao, Hanoi.

OKAZIS ...

75-a Universala Kongreso de Esperanto (Havano, 14/21 Julio)

Aliĝis al ĝi 1.617 gekongresanoj el 54 landoj. Aparte la jam kutimaj kongreseroj, estis vera novaĵo la ĉeesto de ŝtatestro Fidel Castro dum la solena inaŭguro de la Kongreso; festparolis, dum tiu-ĉi inaŭguro, la kongresa Alta Protektanto, Carlos Rafael Rodríguez, vicprezidanto de la lando. La Kongreson ĉeestis almenaŭ 400 kubanoj, kio sufiĉe bone ilustras la viglecon de la kuba E-movado.

La venonta Universala Kongreso okazos en Bergen (Norvegio).



Dum la inaŭguro; Fidel Castro en la centro, ĉe li, dekstre en la foto, O-ro John Wells, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, maldekstre Jesus Castillo, prezidanto de LLK kaj de Kuba E-Asocio.

1-a Rumana E-kongreso (Julio 1990)

Post la renaskiĝo de Rumana E-Asocio, en Januaro 1990 kaj nuligo, far de la Ministerio pri Klerigado de la malpermeso instrui Esperanton (ekde 1985), kune kun konfirmo ke oni rajtas instrui la lingvon en ĉiuj universitatoj kaj aliaj altlernejoj, denove ekmarŝas la E-movado en Rumanio. Tiel, meze de Julio, en la universitato de Timişoara, okazis la 1-a Rumana E-kongreso; ĉeestis pli ol 300 geesperantistoj, estis prezentita kultura programo kaj elektita nova estraro. En tiu-ĉi sama urbo, Timişoara, komencis, en Septembro, la unua kurso por E-instruistoj.

Televida E-kurso en Ĉinio

Nuntempe, la ĉina televido dissendas, trifoje semajne, la televidan E-kurson "Espero", kiu konsistas el 24 duonhoraj lecionoj. Ĝi havas la formon de televida teatraĵo, kiu harmonie kombinas instruadon kaj amuzadon, kaj prezentas Esperanton en tre vivecaj parol-situacioj.

Por faciligi la lernadon, oni jam eldonis lernolibrojn kun detalaj klarigoj, tri kasedojn kaj kvar videobendojn. Cetere, Ĉina Centra Televid-Stacio, Universitato Qingdao, Ĉina E-Ligo kaj "El Popola Ĉinio", kune funkciigos korespondan E-kurson, akompana al la televida kurso. La aliĝintoj, kiuj sukcesos trapasi la finan ekzamenon en Novembro, ricevos diplomon de la Universitato Qingdao.

Ĝis fino de Junio, formale aliĝis al la kurso pli ol tri mil personoj; kontentiga nombro, se oni konsideras ke al angla lingva kurso aliĝis ses mil, kaj al franclingva nur kelkcentoj.

Unuaj kunsidoj de la tutmondismo "La Iĝanta Mondo"



En tiu-ĉi unua kunveno de la mond-civitanoj, okazinta Aprile en Tours (Francio), kun la partopreno de 800 kunvenintoj el 25 landoj, Esperanto estis unu el la kvar oficialaj lingvoj, kune kun la angla, franca kaj hispana. Estis debatoj pri la temoj: Paco, disvolviĝo , ekologio kaj monda demokratio.

Radio Viena: dua loko

En 1.989, la redakcio de la E-lingvaj dissendoj ricevis 2500 skribaĵoj de aŭskultantoj; la anglaj programoj ricevis 5.000, la hispanaj 2200 kaj la francaj 1800.

(Pri radio-stacioj kun E-elsendoj kaj horaroj, vidu la pasintan numeron de NIA PONTO.)

555 Turismaj Prospektoj

Enketo plenumita de Constant M. J. Bonemans por Germana E-Asocio ebligis la starigon de listo de 555 turismaj eldonaĵoj en Esperanto. En tiu-ĉi cifero troviĝas 21 landaj, 62 regionaj, 323 urbaj prospektoj, 103 turismaj broŝuroj kaj libr(et)oj, 46 eldonaĵoj pri trafiko (aviadila, aŭtobusa kaj ŝipa). Fakte, 556 se ni konsideras la broŝuron pri Bilbao eldonita la pasintan jaron de la Bizkaja Deputacio. Tiu-ĉi turisma broŝuro, kiu traire prezentas la urbon (vaske, hispane kaj esperante), vi povas peti ĉe nia Grupo.

9-a landa E-kongreso de Sovetrespublikara E-Unio

Tiu-ĉi ŝtat-kongreso de la sovetiaj esperantistoj okazos, de la 19-a gis la 22-a de Decembro 1990, en Moskvo, en luksa konferencejo "Olimpijec", kun SEU-estrara kunsido kaj dutaga kleriga kaj kultura programo.

1-a Afrika Kongreseto (Decembro 1990. Lomé - Togolando)



La kongreseton gastigos Unuiĝo Togolanda por Esperanto kaj la kongresa programo disvolviĝos en Lomé, de la 28-a de Dec. ĝis la 2-a de Januaro; poste (2/10 Jan. 1991), okazos ekskurs-vojaĝo per aŭtobuso (eble ankaŭ per ŝipo) tra Benino, Niĝerio, Ganao ĝis E-bura Bordo.

34-a Internacia Seminario


Tiu-ĉi jam fama internacia jarfina aranĝo de Germana E-junularo, okazos ĉi-jare en Finnentrop (Germanio), de la 27-a de Decembro ĝis la 3-a de Januaro 1991-a. La debat-temo estos: "Mez-Eŭropo, kien vi iras?".

Promen-skiado en Svislando

Post kristnaska festo, Instituto Internacia Edmond Privat okazigos, en la Chaux-de-Fonds (Svislando), de la 26-a de Decembro ĝis la 3-a de Januaro, vintro-feriadon, kun promen-skiado, prelegoj (inkluzive de Dro. Hans Michael Maitzen, profesoro ce la Viena Universitato), pretigo al E-ekzamenoj, ktp.

GASTEJO EDMOND PRIVAT
de Kultura Centro Esperantista - KCE
(Chemin des Postiers 27,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds,
Svislando)
estas dum la tuta jaro
ideala hejmo por studemaj
kaj promenemaj esperantistoj.
Petu la informilon!






Bukedo da infanoj de la lernejo en Amangoua (Eburbordo) kaj floroj apud la lernejo. Tiu grupo aperigas Esperantan kurieron, kiujn la infanoj mem verkas kaj ilustras. Ni aperigas unu rakonton el ĝi. Dekstre oni povas vidi s-ron Kouablan, la Esperanta vigliganto.

La kverelo de la kato kaj la hundo

La kato kaj la hundo estis du bonaj amikoj, kaj ili vivis kune en la sama domo kiel fratoj. Unu tagon ili iris al la vendejo, aĉetis poton da butero kaj ili metis salon sur la buteron kaj fermis ĝin per pura kaj blanka tuko. Ili iris poste al la kampo por planti ignamojn, sed en la kampo la kato diris al la hundo: "Kara amiko, mi tute forgesis ion. Mia kuzo invitis min al sia domo por esti la atestanto de la bapto de siaj filoj." "Ho, ne gravas, kara amiko, mi laboros por ni ambaŭ." respondis la hundo.

La kato iris al la domo kaj prenis la poton da butero, retiris la tukon kaj manĝis la duonon.

Vespere la hundo revenis al la domo kaj konstatis, ke oni manĝis la duonon de la butero. Post kelkaj horoj la kato alvenis kaj sen tro atendi la hundo demandis al sia amiko: "Kara amiko, kiu manĝis la duonon de la butero?" kaj por ironii la kato diris: "Eble la filoj de mia kuzo kaj mi! Sed ni manĝis kaj lasis ion!" La hundo komprenis, ke la kato ne estas ĝentila kaj do ili batalis kaj la kato vundis la hundon kaj jen, kial hundoj kaj katoj estas ofte malamikoj.



N'cho Attaba Didier, 6a klaso (15 jara)
el "La kuriero d'Amangoua"
Eburborda Esperanto-Asocio,
B.P. 147, Abijan 09.

el "JUNA AMIKO", revuo por lernejanoj kaj komencantoj. Eldonata de Hungara E-Asocio.


SPECIALA REVUO,
pri
KRUCVORTOJ
kaj aliaj
SPRITAJ LUDOJ
(Šaradoj, rebusoj, anagramoj, puzloj)

ENIGMO

Kun Konstantaj rubrikoj
ŠAKO, GOO, SKRABLO
CIVILIZAJ SEKRETOJ
(N^ro 1 - Majaa skribaĵo)

Provnumero (Kun abontarifo kaj rabatoj por nepagipovaj landoj)
HAVEBLA KONTRAŬ 1 IRK. ČE
Revuo «ENIGMO»
BP 7 31914 Toulouse Cedex FRANCIO





NIA PONTO Redaktis: Jesús M. García kaj Iñaki Vélez